

Kunvoko al Jarkunveno

La 1an de Julio 2012 je la 9a, en Kastelo Greziljono

La Jarkunveno de la Kulturdomo de Esperanto okazos dimanĉon matene, 1an de Julio, inter la 9a kaj la 12a. Ni estos ĵus festintaj (sabaton, 30an de junio) la sesdekjariĝon de la Kulturdomo. La nova Komitato kunsidos dimanĉon posttagmeze (elekto de la estraro)

La eksterordinara membrokunsido en la 12a de marto 2012 voĉdone akceptis novan statuton. Laŭ tiu ĉi statuto, necesas elekti en 2012 duonon el 10 membroj de la nova administra komitato. Per tiu ĉi kunvokilo ni petas la societanojn voĉdoni perkoresponde por tiu ĉi nova komitato, tiel, ke la plenigita voĉdonilo atingu la Kulturdomon plej malfrue vendredon, la 29an de junio. Nombradkomisiono nombros la ricevitaĵajn voĉdonilojn jam vendredon la 29an de junio.

La societanoj, kiuj ne povos mem vojaĝi al Greziljono, bonvolu sendi sian rajtigilon kompletigitan per la nomo de societano, kiu ĉeestos la Jarkunvenon, kontaktante tiun ĉi rajtigilon, ĉar laŭ la nova statuto ĉeestanto povas anstataŭi maksimume kvin societanojn (eblas konsulti la liston de la societanoj, kiuj anoncis sian ĉeeston, en la retejo «gresillon.org»; Notu, ke se la rajtigilo estos ne kompleta, tiu ĉi ne validos por la voĉdonoj, tamen ĝi estos enkalkulita en kontrolado de la kvorumo necesa, por ke la jarkunveno okazu, nome sesono de la societanoj.

Tagordo

Je la 9a00 : subskribado de la listo de ĉeestantoj (ĉiu subskribu por si kaj por siaj anstataŭatoj)

- 1) elekto de kunsidaj prezidanto kaj sekretario
- 2) nombrado de ĉeestantoj kaj rajtigoj
- 3) evoluo de la nombro de societanoj, kontrolado de la kvorumo
- 4) rezulto de la elekto de 5 membroj de la Administra Komitato
- 5) agadraporto 2011 : pridiskuto kaj voĉdono (dum la kunsido mem)
- 6) financa raporto 2011 : pridiskuto kaj voĉdono (dum la kunsido mem)
- 7) antaŭvidita buĝeto 2012
- 8) rezolucio koncerne ERDF (tutfranca firmao pri elektrotransportado)
- 9) rezolucio koncerne la projekton de Ŝtonĉjo (Pierre Soubourou) kaj Libnjo (Elizabeth Dubot) pri mastrumado de la kastelo
- 10) ceteraĵoj

Agadraporto 2011

La jaro 2011 estis la unua jaro komplete sub administrado de la nova Komitato kun 12 membroj elektitaj la 29an de majo 2010.

Ni plenumis la agadojn de la Kulturdomo, la mastrumadon de la bieno, kaj ni laboris por efektiviĝi la projekton pri malfermo de la kastelo al ne Esperantista publiko.

Agadoj 2011

- La unua « printempa semajno » okazis de la 30a de aprilo ĝis la 7a de majon 2011. Ĝi estis organizita kunlabore kun ILEI: ties prezidanto Stefan MacGill kaj Christophe Chazarein trejnigis 25 « lernantojn » por KER-ekzamenoj, la unua por B2 aŭ C1 niveloj, la dua por B1-nivelo. Fine de la semajno, venis en la kastelon 8 kromaj personoj por trapasi la kompletajn ekzamenojn. La ekzamenantaro konsistis el Katalin Kovač kaj François Lo Jacomo. Jannick Huet estis staĝestro, dum Sunjo Cash, Oscar Ayuso Candéla kaj Françoise Guihaumé okupiĝis pri kuirado kaj purigado.
- La somera programo proponis « pedagogian semajnon » de la 17a ĝis la 23a de Julio (21 staĝanoj), « alternativan semajnon » de la 23a ĝis la 30a de julio (16 staĝanoj), « turisman semajnon » de la 30a de Julio ĝis la 6a de aŭgusto (19 staĝanoj), « festan semajnon » de la 15a ĝis la 24a de aŭgusto (22 staĝanoj). Venis kromaj vizitantoj, interalie grupon de 20 Ĉinoj survoje al renkontiĝo en Pluezek. Ni dungis Sunjon Cash por kuirado dum tiuj ĉi kvar semajnoj. Krome laboris la staĝestroj : François Lo Jacomo, Xavier Godivier, Jannick Huet kaj Bert Schumann, la volontuloj por kuirado kaj purigado, Marie Savary (ankaŭ gvidantino pri jogo), Louis Jeuland, Sylvie Ternant, Jean-Pierre Poulin (ankaŭ gvidanto pri gitaro),

instruantoj kaj gvidantoj de aktivaĵoj Nina Korĵenenskaja, Jean-Luc Kristos, Ranga Potturu (kiu venis el Barato por gvidi kursojn kaj en Greziljono kaj poste en Pluezek), Thierry Saladin, Francisko Simonnet, Krome, laborisdum tiuj 4 semajnoj, la staĝestroj :François Lo Jacomo, Xavier Godivier, Jannick Huet kaj Bert Schumann, les volontuloj por la kuirado kaj mastrumado, Marie Savary (ankaŭ animanto pri jogo), Louis Jeuland, Sylvie Ternant, Jean-Pierre Poulin (ankaŭ animanto pri gitaro), la instruistoj kaj animantoj Nina Korĵenenskaja, Jean-Luc Kristos, Ranga Potturu veninta el Hindujo kaj kiu partoprenis ankaŭ la renkontojn de Plouézec, Thierry Saladin, François Simonnet, Michel Dechy, Catherine Kremer, Caroline Mauboussin, Rolande Cleizergues.

Fine, itala kantisto Emannuele Rovere prezentis trifoje sian spektaklon.

- La jarfina renkonto de la 27a de decembro ĝis la 2a de januaro 2012 estis organizita de Bert Schumann. Ronan Le Corre estis nia kuiristo kaj preparis festenon por la jarfina festo.

Ludonoj 2011

- La kastelon ni ludonis por du familiaj festoj en junio kaj septembro, por infanferiado dum la du unuaj juliaj semajnoj kaj fine de aŭgusto por la staĝo pri olimpiada matematiko de Animath.

- Ni gastigis Esperanto-asociojn: en aprilo, Esperanto-Bondy luprenis dum unu semajno por FRINGOJ, en aŭgusto JEFO luprenis dum unu semajno por FESTO, komence de septembro EDE luprenis dum tri tagoj por sia somera universitato.

Bonteno de la bieno

- Oni instalas elektrajn hejtilojn en la parto sen centra perakva hejtado, kaj unu en salono Zamenhof, sufiĉaj inter aprilo kaj novembro. Tiu ĉi nova hejtrad-sistemo kontentige funkciis dum la jarfina FESTego kaj en aprilo 2012, tamen al la hejtiloj fiksitaj en la teretaĝo (provizoraj ĝis instalado de alia hejtrad-sistemo) necesis aldoni moveblajn elektrajn hejtilojn.

- La lampoj indikantaj savelirejojn en la koridoroj de la kastelo estas anstataŭigitaj konforme al la nova normo.

- Ni realigis slabon el kalkobetonu por stapli tablojn kaj seĝojn apud la salono Zamenhof, kaj malmunteblan podion kun ĉi-rilata lumsistemo en tiu ĉi salono.

- Du duŝejoj konstruis Yves Couturier en la dua etaĝo de la kastelo.

- Diversaj konstrulaboroj estas faritaj en la kuirejo kaj apudaj ĉambroj por obei higienajn normojn.

- Maldensigon de la arbaro plenumis arbohakisto, poplojn oni forhakis, kaj plejparton de la restanta ligno oni forigis el la koncerna tereno, tamen restas en la fono, en malseka loko ne atingebla per maŝinoj, iom da morta ligno. Notu, ke Jannick Huet partoprenis en 2012 klerigsesiojn de C.R.P.F. por estigi simplan planon pri volontula mastrumado de la arbaro (interalie cele al studado kune kun profesiuloj de la estonta prizorgado de la koncerna tereno).

- Problemojn pri tubaroj eligantaj malpurajn akvojn oni konstatis en aŭgusto kaj solvis fine de 2011 – komence de 2012, interalie dank'al rimarkinda laboro de volontuloj (eĉ en plej malvarma vintro). Nia tubaro kontentigas nun la aktualajn normojn.

Komunikado

La retejon « gresillon.org » regule ĝisdatigas Bert Schumann, ĝi ebligas interalie retan aliĝon al niaj staĝoj. Flugfolio prezentanta la Kulturdomon en Esperanto (kun programo 2012 kaj nova emblemo) estis eldonita ĝustatempe por disdonado dum la Universala Kongreso en Julio 2011. Ĉiuj rajtas nun printi niajn flugfoliojn (en Esperanto kaj/aŭ en la franca) per la modelo en la akceptopaĝo de la retejo « gresillon.org ».

Aperis krome en 2011 pluraj artikoloj en Esperantistaj gazetoj (la Ondo de Esperanto, la SAGO, UFE-revuo Le Monde de l'Espéranto...).

Projektoj cele al pli larĝa malfermo

La rebakadon de la statuto plenumis la Administra Komitato helpe de Advokato Niaufre, ĝis aprobo de nova statuto dum Eksterordinara Membrokunsido en marto 2012. Tiu ĉi nova statuto ebligas interalie nun proponi al ne-societanoj lupreni la bienon.

La Komitato laboris cele al trovado de « projekt-gvidanto » cele al mastrumado de la bieno ebliganta malfermi ĝin kiel eble plej longe dum la jaro. Ŝtonĉjo (Pierre Soubourou) proponis sin jam en septembro 2011 kaj prezentis al la societanoj antaŭ-projekton en marto 2012. Aprobo de lia projekto kuŝas en la tagordo de la nuna membrokunveno.

Financa raporto 2011

Ni ĝojas duafoje prezenti al vi profitan spezkonton je 4 573 €. Per rimedoj je 57 000 €, ni retrovas saman nivelon kiel en la jaro 1997. Prestajproponadoj atingas 45 000 € plie je 26% kompare al pasintjaro. Tia ĉi rezulto fontas el pli larĝa malfermo de Greziljono dum nesomeraj sezonoj, akcepto de neesperantaj grupoj kaj daŭra intensa volontula agado.

Redakti ĉi tiun raporton revenigas profundan tristecon pro morto de Christian Vacheron, kiu tre efike plenumis la kasistan laboron de la kulturdomo. El liaj kontoj eblas atingi kelkajn gvidospezojn. Meze, ĉiu el la 5 staĝosemajnoj enspezis 1 200 € kiel staĝ-aligoj, 1 900 € pro loĝado, 2 400 € pro manĝoj, 400 € pro ceteraj enspezoj, kaj elspezis 1 500 € da manĝaĵoj kaj 1 000 € da vojaĝkostoj. Cetere, ni pagis 3 800 € por salajri helpantinojn pri manĝopreparado.

Ni tamen memoru, ke kelkajn rimedojn restos esceptaj en 2011 : vendo da ligno je 7 000 € kaj repago de asekurejo post nia plendo pro gelado en 2009. Kiel antaŭvidite, danke al pluraj investlaboroj kaj gravaj riparoj, nemeveblaĵoj nove kreskas kaj ankaŭ amortizoj je 11%.

Financa situacio de la kulturdomo stabiligis kaj komforta disponebla mono je 80 000€ ebligas imagi daŭrajn investojn pri sekurecaj normoj de la bieno kaj plibonigo de ties komforto.

Ni proponas al societanoj aprobi la kontadon, ties raporton kaj decidi enskribi en leĝa rezervo 15% de la rezulto : 685,95€.

REZOLUCIOJ

Projekto ERDF

ERDF sendis al ni du servuto-konvenciojn (unu por la urbo Pontigné, la alia por la urbo Saint Martin d'Arce) permesante installi, en nian bienon, mez-tensian elektran linion enterigitan je 1 m. Claude Bensimon pridiskutis la kondiĉojn kaj kompensojn por tiu installado (enterigi koste de ERDF niajn proprajn elektran kaj telefonan liniojn, ne installi la linion tro proksime de konstruaĵoj, rekonstrui la vojon...). La finaj planoj estis ellaboritaj kaj la laboroj pri niaj linioj estis inkluditaj.

Servuto signifas ke ni permesas al ERDF interveni iam ajn, se necese, pri la linioj instalitaj en nia bieno, tio postulas aprobon de la Ĝenerala Asembleo. Post la fino de la installado, ERDF plej verŝajne venos tre malofte ĉar linio enterigita postulas malpli da kontrolo ol "aera" linio.

Monaj kompensoj estas antaŭviditaj (pagotaj unufoje 492 € por la parto en Pontigné kaj 192 € por tiu en Saint Martin d'Arce), tamen, ĉi tiuj kompensoj estas malmulte kompare kun la kosto de la laboroj por kiuj ERDF pretas pagi (rekonstruo de la vojo kaj enterigo de la telefona kaj elektra linioj nuntempe "aeraj"). Estas dank'al tiuj laboroj ke tiuj konvencioj estas allogaj por la kulturdomo.

Rezolucio 1: La membrokunveno aprobas la subskribon de servuto-konvencioj "CONVENTION CS 06/05/SM numero D327/102912" en Saint Martin d'Arcé kaj Pontigné.

Projekto de mastrumado de la kastelo (Pierre Soubourou) + Projekto de agrikultura evoluo de la bieno (Elizabeth Dubot)

Pierre kaj Elizabeth prezentas siajn projektojn en kunigita teksto kaj petas aprobon de la membroj por starigi kontrakton. Ili petas kontrakton por unu-jara provo, por konstrui la mastrumadan kaj agrikulturan entreprenojn, realigi merkato-enketojn kaj kontakti estontajn partnerojn. Tiaj agadoj povos kohere integriĝi kadre de globala projekto de ĝeneraligita informado, kiel prezentita de Claude Bensimon (projekto legebla en la retejo de Grezijono).

Dum tiu jaro, loĝebleco estos provizita senpage por permesi efikan lokan agadon.

Rezolucio 2: La membrokunveno aprobas, ke la komitato pridiskutu kontrakton inter la kulturdomo kaj Pierre Soubourou, Elizabeth Dubot por unu-jara provo. Bilanco kaj nova rezolucio estos prezentitaj dum la membrokunveno de 2013.

✂.....✂.....✂.....✂.....✂.....✂.....✂.....

Maison Culturelle de l'Espéranto Kulturdomo de Esperanto Grésillon 49150 Saint Martin d'Arcé France Rajtigilo por la Ĝenerala Kunveno de la 1 ^a de julio 2012 Pouvoir pour l'Assemblée Générale du 1a de julio 2012	Mi, subskribinto / Je soussigné..... Adreso / Adresse:..... Tel :Retadreso/courriel..... Rajtigas S-on/S-inon / Donne pouvoir à Mr, Mme..... reprezenti min ĉe la Ordinara Ĝenerala Kunveno de la societanoj okazonta sabaton la 1 ^{an} de julio 2012 en Grezijono / de me représenter lors de l'Assemblée Générale du 1er juillet 2012 à Grésillon. Dato/Date : Subskribo/Signature :
---	--